

La Progreso

REDACTIE-
COMITE
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

FOR LA AKUZATIVONI!

Ne kara leganto, vidante tiun ĉi alarmigan titolon vi ne pensu, ke ni deziras ribeli en paca Esperantio (por konservi la pacon ankaŭ: Esperantujol) aŭ enkonduki reformon! Reformemaj esperantistoj ĉiam pruvigis niaj internaj malamikoj, kiuj tuj fariĝas malamikoj eksteraj, se la esperantistaro ne pretas akcepti iliajn bonfarojn.

Ni ne proponas reformon, nur simplan ordigon en dubinda afero, kiu eĉ al spertuloj kaŭzas embarason kaj ĝenon. Por forigi tiun ĝenon ni ne bezonas tuŝi la Fundamenton.

Ni klarigu:

Se ni tradukas personan nomon en Esperanton, ni devas konsekvence skribi tiun nomon akuzative, se ĝi estas objekto, enz.: *li amas Marion*. Sed ne ĉiujn personajn nomojn oni tradukas. Se netradukita nomo finiĝas per vokalo, ni facile inklinas uzi ĝin akuzative: *li amas Martan*. Sed estiĝas malfacilo, se la nomo finiĝas per konsonanto. En tiu kazo oni kelkfoje uzas interligan streketon: *ŝi amas Kees-n*. Sed bela tio ne estas! Kaj ankoraŭ pli malbela tio fariĝas, se la nomo mem jam finiĝas per *n*: *mi renkontis Jansen-n*.

Sed vera problemo fariĝas la afero, se ni devas uzi citilojn. Inter citiloj oni kutime skribas nomojn de institucioj, entreprenoj, libroj, gazetoj k.t.p. kaj recipe nomojn el aliaj lingvoj pro ia motivo netradukendajn. Volante ankaŭ tiukaze uzi la akuzativon oni povas elekti inter: *li studis „Hamleton“*, *„Hamleto-n“*, *„Hamleto“n kaj „Hamleto“-n*. Fiksita sekundo ne ekzistas.

Sed nun la leganto mem diru, kie ni skribu tiun *n* en la jenaj titoloj: *„Tra la labirinto“*, *„For la batalilojn!“*, *„Le-*

teroj de Zamenhof“, *Morto de trajno“*, *„La princo kaj Betty“*, *„La amo en la jaro dekmil“*, *„La brava soldato Svejk“*, *„La vojoj estas nekonataj“*, *„Quo vadis?“*

Sendube la akuzativo rilatas al la nomo kiel tutó. Konsekvence ni do devus skribi, ke *li studas „Tra la labirinto“* (sed tiam la signifo de la titolo tordiĝas) aŭ ke *li legas „Judoj sen monon“* (nun oni uzas akuzativon post prepozicio) aŭ *„Mr. Tot acetas mil okulojn“*. Por eviti la duoblan *n* oni povus skribi... *okulojn-n*, sed estetika tio certe neniam fariĝas.

Oni povas savi sin el tiu embaraso per akuzativigo de la kerno de l' titolo, ekz.: *li posedas „Fundamenton de Esperanto“*, *„Judojn sen mono“*, sed ĉiu sentas, ke tio ne estas logika. Oni ja ne posedas la fundamenton de Esperanto, sed la libron titolitan „Fundamento de Esperanto“. Kaj laŭ tiu regulo ni devus diri, ke *ni legis „En okcidento nenion novan“*. Sed ankaŭ tiu metodo ne solvas la problemon. Kiel ni ekz. skribu, ke *ni legis „Riĉa kaj sen mono“*, *„La vojoj estas nekonataj“*, *„Ĉu li?“* k.m.a.?

Kiun interesas la problemo, tiu klopodu solvi ĝin kiel ajn, kondiĉe ke li elpensu sistemon konsekvencan — pri logiko ni eĉ ne penul! Sed rigardo en la propran libroŝrankon konvinkos ĉiun, ke el kia ajn sistemo rezultus nur strangajoj, torditaj nomoj, sensencaĵoj kaj malbelaĵoj, kaj oni jam ne scias elirvojon inter *„Gösta(n) Berling-n“*, *„Patroj(n) kaj filojn“*, *„Jarmiloj pasas-n“*, *„Vivo vokasn“*, *„Akbar“-n*, *„Quo vadis?“-n*. La afero fariĝas inkubo, kaj la leganto sendube jam demandas al si: ĉu tia haoso povas ekzisti en nia „logika kaj sistema Esperanto“?

POR KOMENCANTOJ

H. Kujit.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactieadres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

WEDERKERENDE WERKWOORDEN.

5.
In het Nederlands zegt men: Ik herinner mij...., hij verbaast zich...., zij haast zich...., wij vervelen ons...., hij verheugt zich...., ik verwonder mij....

Wie de les in het vorig nummer goed heeft bestudeerd, zal deze voorbeelden prompt, en zeer juist, vertalen met: *Mi memoras...., li miras...., si rapidas...., ni enuas...., li ĝojas...., mi miras....* In het Nederlands zegt men echter ook wel: Ik herinner hem aan zijn belofte. Hij verbaast (verwondert) ons door zijn antwoorden. Zij haast mij iedere morgen. Wij vervelen hem met ons gepraat. Het kind verheugt ons door zijn vlijt. Bij deze werkwoorden is het dus wel mogelijk een ander persoon te noemen in plaats van ZICH, MIJ of ONS. We herhalen, een nationale taal heeft vele eigenaardigheden, die in strijd zijn met de logica. Men zegt dit wel zo, maar men bedoelt: Ik MAAK dat hij ZICH zijn belofte HERINNERT. Hij DOET ONS VERBAZEN door zijn antwoorden. Zij MAAKT dat ik MIJ iedere morgen HAAST. Wij MAKEN dat hij ZICH VERVEELT door ons gepraat. Het kind MAAKT, dat wij ONS VERHEUGEN door zijn vlijt. Bij het vertalen van zulke zinnen make men zich geheel los van de Nederlandse vorm. Men weet: zich herinneren = *memori*, zich verbazen = *miri*, enz. Maakt men nu, dat een ander ZICH HERINNERT, dan zegt men in Esperanto: *Mi IGAS LIN memori*, of het gebruikelijke: *Mi memorigas lin*. De bovenstaande zinnen vertale men dus als volgt:

Ĝi povas, sed ne devas ekzisti, ĉar la esperantistoj ĝenerale volas fari la lingvon pli malfacila ol ĝi estas. En nia tuta vivo validas la ne ĉiam konsciata regulo: se iu aranĝo povas estis komplikita, oni ne faru ĝin simpla. Tiu stranga regulo infektis ankaŭ la esperantistojn. Kial do ni cerbumu pri akuzativo kiu ne havas celon kaj estas facile evitebla? Se ni forjetas ĝin ĉe interĉiitilaj propraj nomoj, ni liberigas nin mem el embarasoj kaj penoj, kaj la legantojn el la malplezuro legi *n-n* lokitajn inter aŭ ekster la citiloj, kun aŭ sen streketo. Cu tiu solvo estas kontraŭa al la Fun-

*Mi memorigas lin pri lia promeso.
Li mirigas min per siaj respondoj.
Si rapidigas min ĉiun matenon.
Ni enuigas lin per nia bablado.
La infano ĝojigas nin per sia fervoro.*

(Samengevat)

Zich vergissen = *erari*.
Zich schamen = *honti*.
Zich ontfermen = *kompati*.
Zich erbarmen = *kompati*.
Zich gedragen = *konduti*.
Zich verbeelden = *imagi*.
Zich inbeelden = *imagi*.
Zich voorstellen = *imagi*.
Zich bewust zijn = *konscii*.
Zich herinneren = *memori*; een ander herinneren = *memorigi iun al'an*.
Zich verwonderen = *miri*; een ander verwonderen = *mirigi iun alian*.
Zich verbazen = *miri*; een ander verbazen = *mirigi iun alian*.
Zich haasten = *rapidi*; een ander haasten = *rapidigi iun alian*.
Zich vervelen = *enui*; een ander vervelen = *enuigi iun alian*.
Zich verheugen = *ĝoji*; een ander verheugen = *ĝojigi iun alian*.

Vertaal in Esperanto. Opgave 10.

De goede vrouw ontfermde zich over het klein meisje. Jan, de oudste van de twee zoons, gedroeg zich zeer beleefd tijdens het bezoek. Haast je niet, je hebt nog een uur de tijd. Als ik zoveel fouten maakte als jij, zou ik mij schamen. De hele dag verveelde hij mij met z'n praatjes. Hij bedroefde zijn ouders door zijn slechte gedrag. Als U zich nog eenmaal vergist, bent U ontslagen. Wij moeten ons goed bewust zijn van de belangrietheid van onze zaak. Verbaas je maar niet over die jongen, het is een zoon van Jansen. Noch hij, noch zijn zoon gedroegen zich als behoorlijke mensen. Tot

damento? Neni! Ni simple konsideru la nomon ne kiel objekton, sed kiel predikativon. Tio eblas, se oni krompensas objekton, do akuzativon *la libron, la gazeton* k.t.p., ekz.: *ni studas* (la libron nomitan) „*Tra la labirinto*”; *ni legas* (la revuon nomitan) „*Voĉo de Islando*”; *ni aĉetu* (la novan eldonon) „*Ni kantu!*”

Cu ni proponas ion novan? Ne, ĉar jam dum sia tuta vivodaŭro „*La Progresanto*” aplikas tiun sistemon. Cu vi ne rimarkis? Tiom pli bone! Strangaĵojn oni kutime rimarkas pli ofte ol simplaĵojn! Do, trankvile daŭrigu legi „*La Progresanto!*”

mijn spijt kan ik mij niets meer herinneren van deze aangelegenheid.

Vertaling van opgave 8.

Hij bracht een hele avond door met over zichzelf te spreken 1). Nadat zij over haar verteld had, begon moeder te huilen. De hond likte het jong, terwijl zij het voedde 2). Terwijl de hond zich likte, jankte hij. De beschuldigde 3) geraakte in verwarring toen hij zich verdedigde. Later wond de advocaat zich op, toen hij hem verdedigde. Alvorens zich te scheren, verwarmde hij water.

1) Ook: *sprekende over zichzelf*. 2) Niet: *nadat: ante...* terwijl; *inte...* nadat; *onte...* voordat, alvorens. 3) Ook: *be-klaagde*. Niet: *aangevallene*, d.i. *atakito*.

Vertaling van opgave 8a.

Lavinte sin 1), li iris en la liton 2). Admonante la knabon, la instruisto eks-citigiĝis 3). Post kiam ili estis vestintaj sin 4), ekpluvis. La kursgvidanto konsilis al la lernantoj, ekzerci 5) sin en la tradukado. Se Johano estus 6) studinta ne tiom bone 7, li ne estus sukcesinta. La virino riproĉis 8) sian filinon, ke ŝi kondutu 9) pli dece 10). Razante sin 11), li vundis sin. Fermu 12) la fenestron, estas malvarme 13). Pro 14) la vento la pordo 15) fermiĝis. Legu ne tiajn librojn; ili ne estas lernigaj 16). Johano estas lernema 17) knabo; li farigis bona esperantisto. La nova kurso komenciĝis la unuan de oktobro. Pri-pensu, 18) antaŭ ol komenci 19). Iru ne sola 20) tra la arbaro; tie estas danĝere 20).

1) Niet zonder *sin*; men kan ook naar bed gaan na een ander gewassen te hebben. Zonder *sin* is dus te ruim van begrip. 2) Ook: *li enlitigiĝis*. 3) Niet: *kolerigiĝis*; *kolerigi* = kwaad worden. 4) Niet: *vestinte sin*; alleen als de bijzin dezelfde persoon tot onderwerp heeft als de hoofdzin, is een bijwoordelijk deelwoord te gebruiken. Ontleden. 5) Niet: *ekzercu sin*. Wel: *ke ili ekzercu sin...* 6) Niet: *estas*; de handeling: *studinta ne tiom bone* heeft niet plaats gevonden. 7) Niet:

bona; men zegt hier iets van een werking. 8) Niet: *mallaŭdis*; dit kan men ook tegenover anderen doen. 9) Niet: *kondutu sin*; zich gedragen = *konduti*. Ook *konduti pli dece*. 10) Ook: *bone*. Niet: *deca, bona*; men zegt hier iets van een werking „*konduti*”. 11) Niet zonder *sin*; ook een barbier kan zich verwonden bij het scheren van anderen. 12) Niet: *ŝlosu*; d.i. op slot doen. 13) Niet: *malvarma*; men heeft hier met een onpersoonlijke zin te doen; men vertale dus met een bijwoord, evenals: *estas bone*; *estas bedaŭrinde*, enz. 14) Niet: *per*, d.i. door middel van. 15) Niet met N; d.i. onderwerp. 16) Ook: *instruaj*. 17) Niet: *lerniga*; een gewoonte of neiging die voortdurend bestaat, drukt men uit met het achtervoegsel „em”. 18) Ook: *konsideru*. Niet: *intencu*: *intenci* = van plan zijn; dit zegt nog niets van overwegen of bezinnen. 19) Ook: *antaŭe konsideru*, *poste komencu*. 20) Niet: *sole*; men vergelijkte: *Ne sole skribu la poemon, sed ankaŭ lernu ĝin. Ne skribu la poemon sola, petu helpon, ĉar ĝi estas tro longa*. In de eerste zin is *sole* te vervangen door *nur*; dit kan in vele gevallen richtlijn zijn. *Sola* is hier een bepaling van gesteldheid. 21) Niet: *dangera*. Wel: *tio* (la irado tra la arbaro) *estas dangera*.

Beoordeling: A. A. D. te Z. 8; D. P. te A. 7; P. W. te Z. 6; A. J. G. te D. 8; J. J. B. te D. 9; J. R. te A. 9; H. J. H. te B. 9; Lupo 9; J. G. D. te Z. 8; P. J. B. te G. 6; C. v. B. te S. 7; P. W. W. te G. 7; J. A. V. te U. 7; G. A. te R. 9; A. B. te A. 9; G. A. te R. 9 (4-49); Astor 9; J. C. M. te Z. 8; G. B. N. te Z. 6.

KOREKTOJ

Post esploro ŝajnas al ni bone korekti en la antaŭa numero la respondon sur paĝo 68a. Oni legu:

2. College van Rijksbemiddelaars = Stata perantaro en laboraferoj. 3. Publierekretelijke Bedrijfsorganisatie = Publikjura Korporacio. 5. Bedrijfspensioenfonds = *industria* pensiokasio.

EEN PRACHT-PROPAGANDA!

Gebruikt voor correspondentie luchtpost-enveloppen met AERPOŬTO en Esperanto-ster, geheel in groendruk. Een niet opdringerige, maar zeker doeltreffende propaganda.

Prijs f 2.— per 100

Bestelt, liefst per postwissel, bij

Boekhandel Van der Heyden, Adm. de Ruyterweg 248a, Amsterdam-W., of
Libroservo F.L.E., Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem

Alles werd in duister gehuld

Zich afwennen

De soep wordt nimmer zo heet gegeten,
als ze wordt opgediend

Radeloze paniek

Een idee aan de hand doen

Onbeschoft optreden

Vooruitlopen op

In 's hemelsnaam

Doen vervagen

Een blaag, die nog niet droog is achter
- zijn oren

Betamen

Zijn aandacht bepalen bij

Zijn snuffel steken in

Iemands woorden te zwaar opvatten

Zich aantrekken

Het zo druk hebben

Een raad opvolgen

Behoorlijk

Een spierinkje uitgooien om een kabel-
jauw te vangen

Opgave 10.

1. Laten wij niet al te zeer op de gebeurtenissen vooruitlopen, maar onze aandacht voornamelijk bepalen bij de huidige toestand. 2. Beste vriend, trek het je niet zo aan. Je moet zijn woorden niet te zwaar opvatten. De soep wordt nimmer zo heet gegeten, als ze wordt opgediend. 3. Had je het zo druk, dat je zelfs mijn brief niet kon beantwoorden? Wat voer je dan toch, in 's hemelsnaam, uit? 4. Je hebt mij een goed idee aan de hand gedaan. Ik ben blij, dat ik je raad heb opgevolgd. Je ziet: men is nooit te oud om te leren. 5. Wen je die onhebbelijkheden toch af en gedraag je zoals het een behoorlijk mens betaamt. Je onbeschofte optreden is de oorzaak, dat iedereen je mijdt. 6. De tijd geneest vele wonden en doet veel geleden smart vervagen, maar toch herinneren de achtergebleven littekens ons steeds weer aan hetgeen geschied is. 7. Een scherpe rook drong de zaal binnen. Plotseling werd alles in duister gehuld en toen iemand uitriep: „Brand!”, ontstond er een radeloze paniek. 8. Houd je mond en ga aan je werk! Je steekt altijd je snuffel in zaken, die je niet aangaan. 9. Houd maar op; ik begriep het al: je gooit een spierinkje uit om een kabeljauw te vangen; maar bij mij zul je geen succes hebben. 10. Je moet zijn praatjes niet geloven. Hij denkt alles beter te weten dan wie ook; maar hij is een blaag, die nog niet droog is achter zijn oren.

Ĉio trempigiĝis en mallumo

Malkutimiĝi de

Ne ĉiu batas, kiu tondras

Saĝperda paniko

Inspiri ideon

Malĝentilaj agmanieroj

Anticipi

Pro ĉielo

Igi, ke malklariĝas

Birdido, kiu elrampis la ovan ŝelon

Deci

Limigi sian atenton ĉe

Meti sian snufan nazon en

Kompreni ies vortojn tro pezaj

Fari al si zorgojn

Esti tiom enlabora

Agi laŭ konsilo

Konvena

Doni ovon por ricevi bovon

Vertaling van opgave 9.

1. La sorto pli favoris mian amikon ol min. Kion mi atingis, tio estas akirita post maldolĉega batalado kaj gravaj scrtobatoj (kontraŭbatoj). 2. Vi povas facile paroli pri: teni kuraĝon (resti kuraĝa), esti bonhumora, venki malfacilaĵojn, ne permesi al la fatalo, ke ĝi terenbatu vin, k.t.p.; tamen, se oni estas tiom miŝanca (malbonŝanca) kiom mi, oni finfine senesperigas (malesperigas). 3. Vi malsparis viajn tempon kaj energion (forton), naĝas kontraŭ la torento(n) (kontraŭnaĝas la torenton), ĉiam pozicias, kiam tio ne konvenas; kaj poste vi miras, ke viaj klopodoj restas sensukcesaj. 4. Post kelkaj momentoj ŝi rompas la silenton. Virina scivol(em)o venkas la dignan sindetenon, kiun ŝi ĝis nun praktikis. „Ĉu vi de malproksime venis?” ŝi demandas. 5. Mi konas tiun viron; mi plurfoje renkontis lin; en neniu kunveno li mankas. Kiel li ja nomiĝas? 6. Kiom malatenta (senatenta, senzorga) vi ja estas! Vi ĉiam forgesas ĉion kaj vi scias: pro kapo malsaĝa suferas la kruroj. 7. Sed, ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn abomenindajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke pli bone konus; se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas (malhelpas) al ili libere komunikiĝadi inter si; se ni komprenus, ke membroj (anoj) de aliaj gentoj estas tute tiaj samaj homoj kiaj ni? 8. Ĉi tio estas oportuna okazo por propagandi Esperanton. Oni ne lasu ĝin

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 10. Vertaal in Esperanto:

LIEFDE VOOR HET DIER.

De tijd, dat de belangstelling van de mens tot het dier uitging, vrijwel uitsluitend, omdat dit laatste toevallig als exploitatie-object kon worden gebruikt, ligt nu wel zo langzamerhand achter ons. Een warmer genegenheid voor het dier is bezig zich in steeds breder kringen te openbaren, een sympathie, die haar diepste grond vindt in de eerbied voor het heilige leven in het algemeen, dat zich ook rijk en ontroerend manifesteert in de gedragingen der dieren. Een streven heeft zich baan gebroken, dat het dier van object heeft verheven tot individu. Tal van maatregelen, die de dieren onder hun hoede nemen, beantwoorden dan ook aan het gevoel voor rechtvaardigheid van het overgrote deel van het volk.

Rinke Tolman.

Op 4 October herdenkt de wereld de sterfdag van Sint Franciscus van Assisi, die niet alleen de mensen, maar ook de dieren heeft liefgehad.

Vertaling van opgave 8.

VIDI PER LA HAŬTO.

Krom 1) la palsent(organo) aperas 2) ĉe blinduloj kaj blind-surduloj kvazaŭ sesa (sent)organo: la kapablo 3) de la haŭto (por) per la atmosfero, ĉirkaŭanta 4) la korpon, akcepti impresojn el la ekstera mondo kaj plu enpenetrigi 5) ilin. Konata 6) amerika surd-blindulino 7) Helen Keller sentas, kiam oni en la ĉambro muzikas 8). Sur la ludejo de lernejo por blindaj (ge)infanoj ĉi tiuj kutime svarmas per rapidaj movoj unu(j) inter aliaj, ne kaŭzante 9) pli da kolizioj ol inter vidantaj infanoj. Ĉi tiun mira-

pasi neuzita. 9. Estu plejble singarda kaj ne tro alte taksu liajn vortojn; li estas unuaranga fanfaronulo; sed se urĝas, li faras nenion. 10. Sajnas al mi, ke li estas tro afabla kaj tro humila; estus interese scii kion li kaŝintencas.

Bonvolu korekti: paĝo 60a, dua kolono. unua linio de supre; **Maljuste** d.e. **Malguste**. Paĝo 69a, dua kolono, 22a linio de supre: **Urĝas** d.e. **se urĝas**. Samaj paĝo kaj kolono, 28a linio de supre

klan 10) kapablon 11) de la blinduloj (por) percepti la ĉeston de homoj aŭ objektoj, kiujn ili ne vidas 12) aŭ tuŝas, oni nomas 13) „vidi per la haŭto”.

Prof. Dr. J. G. Sleswijk.

1) Niet: *ĉe aŭ post*. Ook: *apud, flanke de, kun*. 2) Ook: *venas, montriĝas*. 3) Ook: *eblo, povo*. 4) Ook: *kiu ĉirkaŭas*. 5) Niet: *prilabori, digesti*. Ook: *utiligi, asimili, absorbi*. 6) Het lidwoord kan onvertaald blijven, daar de eigenaam volgt. 7) „Surd-blindulino” of „blind-surdulino” maakt hier geen wezenlijk verschil uit. Ook: *surd-blinda*. 8) Ook: *faras muzikon*. 9) Ook: *sen ke ili kauzas*. 10) Ook: *mirigan*. Niet: *mirindan*. 11) Bijna alle vertalers vergaten hier, dat het onderwerp „oni” is, aan het einde van deze lange zin. 12) Niet: *sen vidi*, want na een voorzetsel (*sen*) moet een zelfstandig naamwoord volgen, maar niet een werkwoord. Ook: *ne vidante*. Bij de zinsconstructie *ĉi tiun miraklan kapablon percepti la ĉeston* k.t.p. is het logisch onderwerp verborgen in „percepti”: *ke ili (la blinduloj) perceptu...* 13) „Wel” zou men kunnen vertalen met „kelkfoje”.

Beoordeling:

H. J. H. J. te B. 9; G. C. de G. te U. 6; F. v. d. M. te U. 7; A. A. D. te Z. 7; A. J. G. te D. 7; Lupo 7; C. J. P. te Z. 6; Th. de G. te L. 6; Kortbirdo 8; Lernanto 6; P. W. te Gr. 5; Alko 6; A. P. L. te G. 8; A. B. te A. 7; G. B. te Z. 7; J. R. te A. 9; E. A. B. te A. 9; P. R. Pzn. te G. 8; T. G. M. te L. 6; G. M. te R. 6; Astor 8; J. C. M. te Z. 8.

Jus aperis:

NI KANTU KAJ DEKLAMU!

Kolekto da 91 kantoj kaj 16 deklamoj.

Prezo: f 1.—.

enmetu inter „wij?” kaj „Dit” la ciferon 8, 22a linio de malsupre enmetu inter „niets” kaj „Hij” la ciferon 10; 13a linio de malsupre enmetu inter „Ne” kaj „mi” la vorton „sinjoro”.

Beoordeling: H.J.H. en B. 10; P.M.W. en G. 7; E.A.B. en A. 8; Lupo 8; J.R. en A. 9; G.A. en R. 8; A.J.G. en D. 8; D.W. en G. 7; J.G.D. en Z. 7; J.v.R. en R. 9; J.A.V. en U. 5; Th. de G. en L. 6; A.L. en H. 7; J.C.M. en Z. 8; Astor 10.

ĈU MALPERMESITA AŬ NEKONSILINDA?

En instruaj verkoj kaj artikoloj, precipe en recenzoj, oni ofte kritikas kunmetaĵojn el substantivo kun epiteta adjektivo kiel „junedzino, belvidejo, grandurbo, solinfano” k.s., sed neniu klare diris *kial* tiaj formoj estas kritikindaj. Nur „Plena Gramatiko” certigas, ke ili estas fremdaj al la Esperanta vortsistemo kaj parte penetris en la lingvon kiel naciaj idiotismoj.

Tio lasta estas interesa por ni, nederlandanoj, ĉar ankaŭ en nia lingvo oni „anatomas” tiajn vortkonstruojn, certigante, ke ili kiel alialingvaj idiotismoj estas fremdaj al la lingvo.

Esplorante la nederlandan vortaron, ni tamen trovas grandan nombron da tiaj vortoj, kiujn oni konsideras vere nederlandaj aŭ kiuj almenaŭ ne estas plu ekstermeblaj pro sia praktike montrita utilo. Ni menciu aron da ili por pravi, ke la adjektiva radiko ne estas ĉiam anstataŭigebla per vera adjektivo, ekz. „grootertog” ne estas „grote hertog”; „blauwzuur, bruinbrood, bruinoker, bruinvis, dieplood, dikbuik, dolhuis, droogkomek, duurkoop, geelgors, geeloker, grootboek, groothandel, grootertog, hoogoven, hoogstand, hoogtij, kleinhandel, leeghoofd, nathals, nieuwbouw, nieuwwjaar, nieuwwkoop, oranjeboom, oudoom, rondhout, roodborst, vergezicht, vetleer, volbloed, vrijstaat, wildzang, witbrood, witlof, witvis, zuurdeeg.”

Kompreneble oni povas defendi kelkajn el ili el diversaj vidpunktoj; sed tio ne forigas la fakton, ke laŭ sia formo ili konsistas el epiteta adjektivo kun substantivo.

Sekve de la aluditaj kritikoj, iam ankaŭ en L.P., ni traktu tiajn ĉi kunmetaĵojn por kontentigi tiujn, kiuj deziras ne nur koni la kritikon, sed ankaŭ ĝian motivon.

Antaŭ ĉio ni konstata, ke en la gramatiko ne ekzistas regulo, malpermesanta la formadon de tiaj vortoj. El tio sekvas, ke ili nepre estas permesitaj! Sed tio ne signifas, ke ili estas ankaŭ rekomendindaj!

Poste ni konstata, ke adjektivoj rilatas al substantivoj precize kiel adverboj al verboj. Krom tio la plej multaj adverboj estas derivitaj de adjektivoj, kaj ĉiu adjektivo tuj fariĝas adverbo, se ĝi, anstataŭ al substantivo, rilatas al verbo, ekz.:

rapida hundo — rapide kuri;
bona homo — bone aĝi.

Ekzistas nenia motivo por kuntiri en unu vorton adverbon kun verbo, ekz. „rapidiri” anstataŭ „rapide iri”, „altflugi” anstataŭ „alte flugi”, kvankam ekzistas kelkaj tiaj kunmetaĵoj, kiujn oni uzas laŭkute, kiel „laŭtelegi” anstataŭ „laŭte legi” (malpli ĝusta traduko por „voorlezen” = „voĉlegi”), kaj „bonfari”, kiu vorto povas signifi ne nur „bone fari”, sed ankaŭ „bonon fari”. Krom nenecesaj, longaj kunmetaĵoj kiel „bonkompreni, malproksimeniri, firmteni, rapidveturi, malbonkondukti” k.s. estas nekonsilindaj el estetika vidpunkto.

Kunmetaĵo el adverbo kun verbo esprimas precize la saman ideon kiel adverbo kaj verbo aparte: „belskribi = bele skribi”. Logike do ekzistas nenia motivo por uzi tiajn kunmetaĵojn. Kaj ankaŭ praktikajn motivojn ni ne konas.

Ankaŭ kunmetaĵoj el adjektivo kun substantivo esprimas la saman ideon kiel adjektivo kaj substantivo aparte: „grandurbo = granda urbo.” Logike do ekzistas nenia motivo por uzi ilin.

Tamen... en Esperanto ludas rolon ne nur la logiko, sed ankaŭ sentoj, praktikaj konsideroj kaj diversnaciaj influoj. Kelkfoje oni sentas bezonon esprimi iun ideon per unu vorto anstataŭ per du. Parte tio okazas pro nacilingva influo, ĉar en kelkaj lingvoj formiĝis similaj kunmetaĵoj por indiki iom apartan ideon, ekz. „ĝentilhomo, grand-sinjoro, rapidvagonaro”. Logike ne ekzistas diferenco inter rapida vagonaro kaj rapidvagonaro, sed praktike oni atribuas al la unuvorta formo specialan signifon.

Pro tio la frazo „la rapidvagonaro veturis malrapide” sonas tute normale. Prave P.G. diras, ke tiaj vortoj parte anstataŭas radikvorton. Ĉar mankas ekz. oficiala vorto por la dika fingro, oni nomas ĝin dikfingro (neologismo: „polekso”).

Do, kvankam el logika vidpunkto kunmetaĵoj el adjektivo kun substantivo estas same nemotiveblaj kiel kunmetaĵoj el adverbo kun verbo, praktike ekzistas motivo por uzi ilin, almenaŭ en kelkaj okazoj. Kaj tiaj okazoj estas: se oni povas esprimi per tia kunmetaĵo iom apartan ideon, do ideon, kiun la vorto origine ne havas, sed kiun ĉiu tuj sentas en ĝi. Kaj oni sentas ĝin, aŭ komparante la vorton kun simila vorto en sia nacia lingvo, aŭ pro tradicia uzado en Esperanto mem.

DE WERKWOORDEN

AFGELEIDE WERKWOORDEN

2. *Overgankelijk of onovergankelijk karakter van afgeleide werkwoorden.*

(Vervolg)

Imposti	Lesivi
Impresi	Limi x
Impulsi	Linii
Incensi	lokaŭti
Instrukcii	lunĉi
interpelac(i)i	Makuli
Interpunkcii	Marki
Intervjui	Markoti
irigac(i)i	marni
Kalki	Marteli
Kandidati x	Maski
kaneli	Mastiki
Kateni	Mastri
Kaŭcii	Mebli
Kaŭzi	Mini
kinematografi	Modeli
Kolori	Motivi
Komplementi	Muziki
Komplezi	Najli
Kompliment	Niveli
Koncepti	Nomi
Kondiĉi	Nombri
Konfederacii	Noti
kongesti	Nuanci
Konjugacii	Numeri
Kontrabandi	Obstrukci
Konturi	Olei
Korki	Ombri
Korni	Ori
Kradi	Ordeni
Krampi	Orienti
Krediti	Ovacii
kreneli	Parfumi
Kroni	Parodii
Kruci	Pavimi
Kuleri	Peniki on.
Kvadrati	Pensii
Kvitanci	Percepti
Laĉi	perturbi
Lati	Piloti
Lekcii on.	Pingli

Pioĉi on.	Skizi
Pipri	Skurĝi
Plagi	Sonĝi
plagiati	Speguli
Plani	Spezi
Polemiki	Spici
Pomadi	Spioni
Portreti	Spliti
Praktiki	Spongi
Premisi	Sproni
Profesii	stereotipi
Profeti	Sterki
Projekcii	Strii
Projekti	Suflori
Propagandi	Sukeri
Psalmi	Sulki
Publiki	Sumi
Pudri	ŝablono
Puĝni	ŝraŭbi
Punkti	Tamburi x
Rabati	Tapiŝi
Radii x	Taski
referendumi	Telefoni
Reklami x	Telegrafi
Respekti	Teruri
Revui	Tirani
Rimi	Titoli
Rimeni	Tonsuri
Sali	Torpedi
Salajri	torturi
Saldi	trati
Sankcii	Tributi
sapei	Trui
Sekreti	Trufi
Seli	Trumpeti on.
Seruri	Vaksi
Sigeli	Valsi on.
Signi	Vati
Signali	Veneni
Silabi	Verdikti on.
Simboli	Vipi
Simii	Vitri
Simpatii x	Vuali
Sintezi	Zoni
Skandali	

(Wordt vervolgd.)

Pro tio ni povas aprobi vortojn kiel „belvidejo, etburĝo, grandduko, grand-industrio, grandsinjoro, grandurbo, ĝentilhomino, junedzino, krudmaterialo, Malgrand-Azio, mezepoko, meznombro, Nord-Hollando, novluno, orientazio, plentago, rapidvagonaro, sekvinbero, solinfano, sovaĝanaro, Sud-Afriko, varmbedo“ k.s.

P.G. diras, ke tia sistemo de vortfarado estas fremda al Esperanto. Same oni

diras pri tia sistemo en la nederlanda lingvo. Kaj en aliaj lingvoj? Sajnas, ke nenie tiu sistemo trovas plaĉon. Tamen, por kelkaj dekoj da specialaj signifoj ni devas apliki tiun sistemon kaj pro tiuj esceptoj ne neglekti ĝian valoron. Oni nur gardu sin kontraŭ ĝeneraligo kaj nepre evitu arbitre formi tiajn vortojn, se ili ne indikas specialan ideon, kiel ekz. „bonamiko, belinfano, dik-homo, granddomo, karmemoro“ k.m.a.

LA HOMA KORPO

B. Rijpstra

LA SKELETO

La skeleto (ostaro) donas fortikon al la korpo, ŝirmas delikatajn organojn, servas por alflikso de muskoloj kaj direktas kaj fortigas movojn.

La ostoj de la torso estas:

la spino: ĝi tenas la torson rekta;

la ripoj: 12' paroj, kiuj ĉirkaŭas la torakon;

la sternumo: antaŭbrusta ostoj;

la klavikloj: inter ŝkapoloj kaj sternumo;

la ŝkapoloj: maldikaj, plataj, triangulaj ostoj de la postaj ŝultrpartoj.

La spino konsistas el:

33 vertebroj; 24 estas moveble interligitaj; la lastaj 9 kreske kuniĝis.

La truoj de la vertebroj formas kanalon por la spina mjelo.

Estas 7 kolvertebroj; la unua (atlaso) portas la kapon; la dua (epistrofo) estas la vertebro, sur kies vertikala elstarajo (apofizo) turniĝas la kranio kaj atlaso (vidu fig. 7 en la proksima numero). Sekvas:

12 dorsvertebroj, kiuj portas la ripojn; 5 lumbovertebroj;

5 sakrovertebroj, kiuj kreske unuiĝis; ĉe la lasta finiĝas la mjelo spina; 4 vosta vertebroj: la vosta ostoj (kokcigo).

La ripoj kaj la sternumo ŝirmas la organojn en la torako (koron, pulmojn).

La ripoj kuniĝas sternumon kaj spinon, escepte la lastaj du paroj, kiuj finiĝas liberaj (ŝvebaj ripoj).

La ŝkapoloj kaj klavikloj formas kune la ŝultran zonan. (Daŭrigota)

Apofizo = beenuisteeksel (osta elstarajo)

atlaso = atlas (unua kolvertebro)

epistrofo = draaier (la dua vertebro, sur kies vertikala apofizo turniĝas kranio kaj atlaso)

klaviklo = sleutelbeen

kokcigo = staartbeen (vosta ostoj)

kreske kuniĝi = samengroeien

ripo = rib

sakro = heiligbeen (antaŭlasta parto de la spino)

ŝkapolo = schouderblad

skeleto = geraamte

sternumo = borstbeen

torako = borstholte

torso = romp (supra parto de la korpo sen kapo kaj sen brakoj)

NEOLOGISMOJ

„HOMOJ EN MILITO“, A. Latszko.

avanci — atingi pli altan (soldatan) rangon (avanceren, promotie maken)

bruska — kruda, ofende abrupta (bruusk)

burso — senceremoniulo, facilanimulo

espozi — elmeti fotografan platon aŭ

paperojn al la sunradioj

glugli — sono de fluidaĵo verŝata el

botelo (klokken)

kalma — interne, anime trankvila, neekscitita

kantonmentigi — ordone loĝigi i.a. soldatojn (kantonneren, inkwartieren)

knali — estiĝi laŭtan sonon pro liberigo

de kunpremita aero (knallen)

lazareto — soldata malsanulejo (lazaret)

lazo — kaptoŝnuro, maŝoŝnuro (lasso)

pojno — manartiko (pols)

sapeo — fosaĵo, laŭ kiu la soldatoj iras

de unu tranĉejo al alia (sappe)

spekti — rigardi kun interesiĝo ekz.

teatraĵon (toekijken, aanschouwen)

statisto — muta rolulo

sufraĝeto — iama betalintino por balot-

raĵto de virinoj (suffragette)

„PATROJ KAJ FILOJ“, I. Turgenjef

anglomano — iu, kiu adore simias an-

glajn kutimojn (anglomaan)

bareĝo — diafana silka ŝtofo por sin-

jorinaj vestoj, nomita laŭ la franca

banurbo Barèges (barèges)

buĥaroj — tatarea tribo loĝanta en tur-

kestana ŝtato Buĥario (Buchaar)

ĉerkesoj — indogermana tribo en suda

Rusio (Tsjerkessen)

desjatinio — rusa aremezuro, 1,0925

hektaroj

ksereso — speco de vino (Xeres)

odekolono — parfumo (eau de cologne)

tarantaso — rusa veturilo

preferanco — evidente prefero ĉe ludo

piemo — pusa infekto de la sango

sinapismo — sinapa kataplasmo (mos-

terdpleister)

„LA LANTERNISTO“, H. Sienkiewicz

kaj aliaj

aŭgustanoj — favoratoj de la romiaj

imperiestroj

ĉukĉoj — mongola popolo en orienta

Siberio (Tsjuktsjen)

Egerio — nimfo el la romia mitologio

emanacio — filozofia termino, signi-

fanta, ke la neperfekta mondo ori-

ĝinas el la perfekta dio (emanatie)

Erebo — mitologia groto, kiun la spirit-

oj devis trairi por veni en Hadeson, la

subteran spiritan mondon (erebus)

(Daŭrigota)

